

SK-14/12

DANIEL QUARELLO

KOMPLEMENTOJ DE L' VERBO



*Komplementoj de tempo.
Komplementoj de loko.
Aliaj komplementoj de l' verbo.*

*Kunmetitaj prepozicioj.
Akuzativo kaj prepozitivo.
Interna akuzativo.*

QUARELLO & Cía.

Eldonistoj

Buenos Aires

3271

LERNU ESPERANTON

de

DANIEL QUARELLO

- I. *Lernu Esperanton.*
- II. *Komplementoj de l' Substantivo.*
- III. *Komplementoj de l' Verbo.*

32-paĝaj volumoj

Aĉetu la eldonojn QUARELLO & CIA. ĉe via kutima libroliveranto.

LERNU ESPERANTON
III

DANIEL QUARELLO

KOMPLEMENTOJ
DE L'
VERBO

*Libro-gvido por niaj
verkistoj, tradukistoj kaj
literaturamantoj.*

QUARELLO & Cía.
Eldonistoj

Casilla de Correo 47 (Suc. 13)
Buenos Aires

Ciuj rajtoj rezervitaj.
Todos los derechos reservados.

Laŭleĝe deponita.
Hecho el depósito legal.

Kopirajto de Daniel Quarello.
Bonaero, 1947.
Copyright by Daniel Quarello.
Buenos Aires, 1947.

*(Estas permesita la uzado de tiu ĉi verko
en lernejoj pri Esperanto. Sed estas
malpermesita ĝia uzado por korespondaj
kursoj, kaj ĝia adaptado, parta aŭ tuta, al
ia ajn alia lingvo.)*

KOMPLEMENTOJ DE TEMPO

La komplementoj de tempo indikas la cirkonstancojn de tempo je kiuj disvolviĝas la objekto de l' verbo.

Difinita tempo.

La komplemento de difinita tempo indikas kiam plenumiĝas la objekto de verbo:

Suneto foriros *sabaton* / aŭ *dimanĉon*.
 Zamenhof naskiĝis *la 15 decembro 1859*.
 Ian *mantenon* ili alvenos neatendite.
 La *lastan aŭtunon* li multe studadis / kaj faris la ekzamenon.

La muzeo fermiĝas *je l' dek sepa (horo)*.
Je l' mateno la koko komencas kanti.
Je kioma horo foriros la vagonaro?
 La abono finiĝos *je julio*.

Mi parolos al vi *en tempo pli oportuna*.
En la tago ke mi vidis ŝin, / mi ŝin amis.
En la venonta jaro mi vizitos Malgrandazon.
En aŭtuno falas la arbofolioj.

Proksimuma tempo.

La komplemento de proksimuma tempo indikas proksimume kiam plenumiĝas la objekto de verbo:

Sinjoro Ŝtonulo estis kaptita *ĉe freŝa faro* kun la peko en la mano.
 Ni manĝos *ĉe tagmezo*.
 La kampanoj ĉesis labori *ĉe l' sunsubiro*.

*Ĉirkaŭ la mateno la ventoblovo finiĝis.
Si vizitos vin ĉirkaŭ la deka (horo).*

*Venu ĉe min inter la dekdua kaj la deksepa (horo).
Inter la levigo kaj la subiro de l' suno la trajno faras kvar vojaĝojn.*

Daŭrotempo.

La komplemento de daŭrotempo indikas kiom daŭras la objekto de verbo:

*Ondina naĝis dum du horoj.
Orkorulino malsanis dum ok tagoj.
La lernanto studadis dum kvin jaroj.
Dum la tuta nokto li sentis kapdoloron.*

*En unu vespero mi ĉion verkis.
En malmultaj monatoj oni povas lerni Esperanton.
En kelke da minutoj Rapidulino vestos sin.
Mi finos legi la tutan libron en kvar tagoj.*

*La koko krias tra l' tuta nokto.
Vin mi petas, / volu resti tra kelka tempo en palaco mia.
La alta urbo, / kiu tra dek jaroj kontraŭstaris la tutan grekan forton.
La formiko laboras tra somero.*

Perioda tempo.

La komplemento de perioda tempo indikas la periodojn je kiuj disvolviĝas la objekto de verbo:

*Mi raziĝas po du tagoj.
Baloto estas farita po tri jaroj.
Po du semajnoj la fraŭlinoj vizitas dancejon.
Po kvar vesperoj ŝi kantas ĉe radio.*

Tempo dum kiu daŭras la stato de l' objekto de verbo.

Ci tiu komplemento indikas la tempon dum kiu kontinuas la stato de l'objekto de verbo:

La komitato forvojaĝis *por tri semajnoj*.
 Pruntedonu al mi vian libron *por unu momento*.
 Ĉapetulino foriros *por ĉiam*.
 Tiu manĝo estas provizo *por sep jaroj*.

Komencotempo.

Ĉi tiu komplemento indikas kiam komenciĝas la objekto de verbo:

Cindrulino estas okupita *de mateno ĝis vespero*.
De du jaroj nia avino malsanas.
De nun mi ne pagos plu viajn ŝuldojn.
 Mi loĝas en Vieno *de tri monatoj*.

Finotempo.

Ĉi tiu komplemento indikas kiam finiĝas la objekto de verbo:

Cindrulino estas okupita *de mateno ĝis vespero*.
 La akademianoj kunsidos *ĝis morgaŭ*.
 La patrino ne forgesos sian amatan filon *ĝis sia morto*.
 Mi bondeziras vin *ĝis la revido*.

La prepozicio *ĝis* povas uziĝi ankaŭ kun infinitivo:

Mi atentos ĉi tie *ĝis vidi lin*.

Antaŭa tempo.

Ĉi tiu komplemento indikas ian tempon antaŭan:

Oni devas pagi *antaŭ la fino de l' monato*.
Antaŭ tri semajnoj li forveturis.
Jam antaŭ du jaroj la instruisto mortis.
Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon.

La prepozicio *antaŭ*, precipe la formo *antaŭ ol*, povas uziĝi ankaŭ kun infinitivo:

Petu mian permeson *antaŭ ol eliri*.
 Ni trinku vermuton *antaŭ ol ekmanĝi*.

Posta tempo.

Ĉi tiu komplemento indikas ian tempon postan:

Post la fino de l' kuranta monato vizitu min.

Post tri tagoj la prezidanto skribos al mi.

Post longaj jaroj de trankvilo la vulkano komencas fumi.

Ekzemploj:

Lia kolero longe daŭris. — Li fermis kolere la pordon. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon. — Ili venis tute ne atendite. — La afero estas ne tute klara. — La pastro, / kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo. — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. — La tablo staras malrekte, / kaj kredeble baldaŭ renversigos. — Frapo post frapo, aperas liaj trafikaj artikoloj pri l' agado de l' nova asocio. — Esperanto konkeris terenon paŝo post paŝo. — Georgo Vaŝington estis naskita la 22 februaro 1732. — Pasteŭr, la franca saĝulo, naskiĝis en 1822 / kaj mortis en 1895. — Zamenhof naskiĝis la 15 decembro 1859 en Bialistok / kaj mortis la 14 aprilo 1917 en Varsovio. — Kolumbo malkovris Amerikon la 12 oktobro 1492. — Mi atendas nur la monaton septembro por forveturi. — La butiko restas fermita de l' 12a ĝis la 14a h. — Lia alveno estis atendata por la 13a h. — Estis ankoraŭ kelkaj minutoj ĝis la 11a. — Estis nur ĉirkaŭ la 8a en la mateno. — Dum kelke da minutoj mi aŭdis du paŝojn. — Mi veturis du tagojn / kaj unu nokton. — Tri semajnojn antaŭe li forveturis. — Jam du jarojn la instruisto mortis. — Ili enuis la tutan tagon. — Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko. — Li ne vivos pli ol unu tagon, / ĉar li estas morte malsana. — Kiam li estis ĉe mi, / li staris tutan horon apud la fenestro. — La vagonaro haltos dek minutojn ĉe tiu stacio. — Laŭ la projekto de l' inĝenieroj tiu ĉi fervojo estos konstruata en la daŭro de du jaroj, / sed mi pensas, / ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn. — Ili restis en Afriko tri jarojn / kaj ses monatojn. — Esperanto estas la plej taŭga, / simpla / kaj ekonomia rimedo por internacia komunikado.

“ĈIUJ PREPOZICIOJ PER SI MEM POSTULAS ĈIAM NUR LA NOMINATIVON”. — “Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, / la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, / sed de aliaj kaŭzoj. — Ekzemple: / por esprimi direkton ni aldonas al la vorto la finon “n”: / sekve: / tie (= en tiu loko), / tien (= al tiu loko); / tiel same ni ankaŭ diras: / “La birdo flugis en la ĝardenon / sur la

tablon" / kaj la vortoj "ĝardenon", / kaj "tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj "en" / kaj "sur" tion ĉi postulas, / sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, / t. e. montri, / ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno / aŭ sur la tablo / kaj tie flugis, / sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, / al la tablo (ni volas montri, / ke la ĝardeno / kaj la tablo ne estis la loko de la flugado, / sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzas la finiĝon "n" tute egale / ĉu ia prepozicio staras / aŭ ne."

Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). — Ni disiĝis / kaj iris en *diversajn flankojn*: / mi iris *dekstren*, / kaj li iris *maldekstren*. — *Flanken, sinjoro* (= Iru *flanken, sinjoro*). — Ili kuris, / la unuj *post la aliajn*. — *Kie* dento doloras, / *tien* iras la lango. — *Kien* kudrilo iras, / *tien* fadenon ĝi tiras. — Li vojaĝas *ĉien*, / kaj *ĉie* oni lin renkontas. — *Kiam* mi ien veturas, / mi *neniam* prenas *kun* mi multon *da pakaĵo*. — Mi *nenien* sendis *ŝin*. — La birdo flugas *en la ĉambro* (= Ĝi estas *en la ĉambro* / kaj flugas *en ĝi*). — La birdo flugas *en la ĉambron* (= Ĝi estas *ekster la ĉambro* / kaj flugas *nun en ĝin*). — Miaj kunuloj veturis *en Amerikon*. — Miaj kunuloj veturis *Amerikon*. — Ni vojaĝis *en Eŭropo*. — Mi sidas *sur seĝo* / kaj tenas la piedojn *sur benketo*. — Mi metis la manon *sur la tablon*. — Multaj birdoj flugas *en aŭtuno en pli varmajn landojn*. — *En varmega tago* mi amas promeni *en arbaro*. — Li staras *supre sur la monto*, / kaj rigardas *malsupren sur la kampon*. — *Kun bruo* oni malfermis la pordegon, / kaj la kaleŝo enveturis *en la korton*. — Grandega hundo metis *sur min* sian antaŭan piedegon, / kaj mi *de teruro ne sciis* / kion fari. — La kuracisto konsilis al mi / iri *en ŝvitbanejon*. — Esperanto estas ilo, / kiun ĉiu uzas por siaj interesoj; / ankaŭ vi uzu ĝin por viaj interesoj.

Unu *el la samideanoj*, / kiuj vizitis min, / havis *almenaŭ 180 centimetrojn da alto*. — Tiu ĉi rivero havas *ducent kilometrojn da longo*. — Mi estas *nur tri paŝojn de l' sojlo*. — Mi staras *nur tri paŝojn de l' sojlo*. — Li havas *ĉirkaŭ sesdek jarojn*. — La dikulo perdis *dek kilojn de sia pezo*. — La du urbetoj situas *kvar kilometrojn / unu de l' alia*. — La ĉefurbo de Bolivio situas *trimil metrojn super la marnivelo*. — Mi sentas *min dek jarojn pli juna*, / ol antaŭe. — *Kvar tagojn post mia alveno en Berlino* mi havis la viziton *de l' direktoro*. — Vi estas *certe la duonon de l' kapo pli alta*, / ol mi. — Tiu ĉi malfeliĉa infano devis *du fojojn en ĉiu tago* iri ĉerpi akvon *en tre malproksima loko*. — Tio ĉi estis la unua fojo, / ke ŝi nomis *ŝin sia filino*. — Ne riproĉu vian amikon, / ĉar vi *mem pli multe* meritas riproĉon; / li estas *nur unufoja mensoginto*, / dum vi estas *ankoraŭ nun ĉiam mensoganto*. — *Je l' lasta fojo* (aŭ *la lastan fojon*) mi vidis *lin ĉe vi*. — Cendo estas centono *de ajn monunuo*. — La oferoj, / kiujn faros ĉiu

homo, / dediĉante iom da tempo por lerni Esperanton, / estas tiel malgrandaj, / kaj la rezultatoj, / kiuj povas elskvi, / se ĉiuj ellernos tiun ĉi lingvon, / estas tiel grandegaj, / ke oni ne povas nefari tiun ĉi provon. (Tolstoj.)

19

KOMPLEMENTOJ DE LOKO

La komplementoj de loko indikas la cirkonstancojn de loko je kiuj disvolviĝas la objekto de l' verbo.

Staro aŭ movo en ia loko.

Miaj parencoj loĝas *en Bulonjo-apud-Maró*.
Sia koro tremis *en ŝi*.
En malproksimo oni ekvidis bluaĵn montojn.
La knabo ludas *en la korto*.

Staro aŭ movo cis ia loko.

Nia popolo loĝas *cis la maro*.
Cis Atlantiko estas Eŭropo.

Staro aŭ movo ĉe ia loko.

Nia asocio estas *ĉe l' strato Zamenhof*.
Sinjorino Cioscia babilis *ĉe l' fenestro*.
Ŝi kudris *ĉe l' tablo*.
La festoreĝinoj renkontiĝis *ĉe l' pordo*.

Staro aŭ movo apud ia loko.

Restu *apud mi*.
Oni fosis sulkon *apud la muelejo*.
La ĉapelo staras *apud la gantoj*.
Apud plena manĝotablo ĉiuj estas tre afablaj.

Staro aŭ movo inter du lokoj.

Inter Francio kaj Rusio kuŝas Germanio / kaj Polio.

*Inter du potoj staras fera kaldrono.
La buboj saltis inter la fenestro kaj la pordo.
Mi pasis la tutan tagon inter kvar muroj.*

Staro aŭ movo tra ia loko.

*Mallargá vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo.
La lumo lumis tra la mantelo.
La suno brilis tra l'branĉoj de l'arbo.
Malrapide ambaŭ iris tra la longa malplena strato.*

Staro aŭ movo ĉirkaŭ ia loko.

*Ĉirkaŭ la korto estas portiko.
Ĉirkaŭ la inkujo kuŝas plumingo, / skrapgumo / kaj inksorbilo.
La amikoj staris ĉirkaŭ li.
La tero rondiris ĉirkaŭ la suno.*

Staro aŭ movo ĝis ia loko.

*Tute ruĝa li estas de l'kapo ĝis la piedoj.
Italio sterniĝas ĝis Alpoj.*

Staro aŭ movo ekster ia loko.

*La elmigrintoj loĝas ekster sia naskiĝlando.
La parko estas ekster la urbo.
Mi trovis la cigarujon ekster la tirkesto.
La gefianĉoj promenis ekster la vilaĝo.*

Staro aŭ movo antaŭ ia loko.

*Antaŭ la kinejo staras monumento.
Subite li ekvidis la abismon antaŭ siaj piedoj.
Iru antaŭ mi, / jen mi venas post vi.
Se ĉiuj balaos antaŭ sia pordo, / tiam en la tuta urbo estos ordo.*

Staro aŭ movo kontraŭ ia loko.

*La urbodomo staras kontraŭ la muzeo.
La du mimikistoj sidis unu kontraŭ la dua.
Li forte apogis la ŝultron kontraŭ la pordokadro.*

Vilaĝoj kuŝas sur la dekstra / kaj maldekstra bordo / unu kontraŭ
la alia.

Staro aŭ movo post ia loko.

La pedelo sidis *post kolono*.
La maljunulino aŭskultis *post la pordo*.
Ŝi rigardis longe *post si*.
La brutoj paŝtis *post la stacidomo*.

Anstataŭ *post povas uziĝi malantaŭ*:

La pedelo sidis *malantaŭ kolono*.
La brutoj paŝtis *malantaŭ la stacidomo*.

Staro aŭ movo sur ia loko.

Nia asocio estas *sur la strato Zamenhof*.
La suno hele lumis *sur la serena ĉielo*.
Sur la tero kuŝas ŝtono.
Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento.

Staro aŭ movo super ia loko.

Super la tero sin trovas aero.
La termometro montras du gradojn *super la nulo*.
Niaj kapoj estis klinitaj *super la laboro*.
Super la domo flugas birdo.

Staro aŭ movo sub ia loko.

La fraŭlo portis paperujon *sub la brako*.
La ĉasistoj dormis *sub libera ĉielo*.
Neĝulino havis kusenon *sub la kapo*.
Ekzistas nenio nova *sub la suno*.

Staro aŭ movo laŭ ia loko.

La ŝoseo estos konstruita *laŭ la fervojo*.
Veronika tre amas promeni *laŭ la marbordo*.
Iru *laŭ tiu direkto*.
Ŝvito fluis *laŭ lia ruĝa vizaĝo*.

Staro aŭ movo preter ia loko.

La pordo troviĝas *preter tiuj fenestroj.*
Preter tiu granda kastelo la vojo kurbiĝas.
Preter la arboj vi trovos la statuon.
 Li pasis *preter mi sen saluto.*

Staro aŭ movo trans ia loko.

Aliaj popoloj loĝas *trans la maro.*
Trans Atlantiko kuŝas Ameriko.

* * *

Veno de ia loko.

La florvazo falis *de l'tablo* sur la pavimon.
 La advokato veturis *de Parizo.*
 La junulino desaltis *de l'ĉevalo.*
 Nia lingvo ne bezonas jam timi, / ke io depuŝos ĝin *de tiu natura*
rekta vojo, / laŭ kiu ĝi evoluas.

Ni eliris *el la urbo.*
 La onklino revenis *el Hispanio.*
 Ne gutas mielo *el la ĉielo.*
 Arabino ĉerpis akvon *el la puto.*

* * *

Iro al ia loko.

Sablero falis *en mian okulon.*
 La viro deŝiris la pomojn, / kaj la virino ilin ĵetis *en sakon.*
 Li rapide metis ion *en sian poŝon.*
 Ne ŝovu la nazon *en fremdan vazon.*

Morgaŭ mi iros *ĉe mian onklon.*

Venu *apud min.*

La soldatoj sin ĵetis *inter la malamikojn.*
 La pilko falis *inter la sinjorinojn.*
 La sovaĝulo ĵetis sagon *inter la kontraŭulojn.*

Ŝi ligis tukon *ĉirkaŭ la kolon.*

Oni metis girlandon *ĉirkaŭ la kolonon.*
La amikoj grupiĝis *ĉirkaŭ lin.*

La gefianĉoj promenis *ekster la urbon.*
La odoro eliris *ekster la domon.*
La infano kuras *ekster la korton.*

Ne ĵetu perlojn *antaŭ la porkojn.*
La sklavo sin ĵetis *antaŭ la piedojn de sia mastro.*

Kain leviĝis *kontraŭ sian fraton Habel.*
Si levis *kontraŭ la ĵunan virinon* siajn okulojn.

La hundo kuris *post la rabiston.*
Rigardu *post la fornon.*
La leporo kaŝiĝis *post la arbon.*

Anstataŭ *post povas uziĝi malantaŭ:*

Rigardu *malantaŭ la fornon.*
La leporo kaŝiĝis *malantaŭ la arbon.*

La florkultivisto verŝis akvon *sur la florojn.*
Kvinope ili sin ĵetis *sur min.*
La fanfaro iradas de strato *sur straton.*

La aeroplano flugis *super la maron.*
Oni ĵetis ŝtonojn *super la muron.*
La krepusko sin mallevas *super nin.*

Li falis *sub la radojn* de veturanta vagonaro.
La laboristo metis paperfoliojn *sub la presilon.*
Puŝu la benkon *sub miajn piedojn.*

Anibalo iris *trans Alpojn.*
La hidroplano veturis *trans la maron.*
Oni ĵetis ŝtonojn *trans la muron.*

La gejunuloj iras *al la lernejo.*
La ĉefo ĵetis esplorantan rigardon *al ĉiuj.*
La fraŭlino rigardis *al la strato.*

La kunularo veturis de Genevo *ĝis Lisbono.*
Vi vidas nur *ĝis la pinto de via nazo.*

La prepozicioj uzeblaj kun libera akuzativo por indiki iron al loko estas:

antaŭ	kontraŭ
apud	post
ĉe	sub
ĉirkaŭ	sur
ekster	super
en	trans
inter	

La prepozicioj:

al
ĝis

kiuj per si mem indikas klare *iron al loko* neniam estas akompanataj de libera akuzativo.

Post la prepozicioj:

laŭ
preter

ŝajnas superflue uzi movakuzativon.

Kaj la prepozicioj:

de
el

kiuj ne indikas movon al loko, kontraŭe venon *de loko* (originon) estas ĉiam sen akuzativo.

* * *

Tufoje la libera akuzativo de iro al loko povas esti neesprimata, kiam en propozicio estas subkomprenata alia komplemento de direkto neesprimata. Ekzemploj:

Oni metis *antaŭ mi manĝilaron*.

La komplemento *antaŭ mi* ne havas akuzativon, ĉar en la propozicio estas subkomprenata alia komplemento de direkto *sur la tablon*, kaj la plena propozicio estus:

Oni metis *sur la tablon / antaŭ mi* manĝilaron.

La ŝtono falis *post mia dorso*.

Post mia dorso ne havas akuzativon, ĉar en la propozicio estas subkomprenata alia komplemento de direkto *sur la teron*, kaj la plena propozicio estas:

La ŝtono falis *sur la teron / post mia dorso*.

Si eltiris siajn blankajn manojn *kontraŭ la ŝipo*.

(= Si eltiris siajn blankajn manojn *en la aeron / kontraŭ la ŝipo*).

Libera akuzativo de direkto indikas en maniero tiel neta la iron al loko, ke eĉ estas eble uzi ĝin kun subkomprenata verbo kiel ekzemple:

Ŝteliston neniu lasas... *en sian domon*.

Ĉi tie la verbo indikanta direkton ne estas esprimata, kaj la plena propozicio estas:

Ŝteliston neniu lasas eniri *en sian domon*.

Vi ne povas... *antaŭen*.

La verbo indikanta direkton ne estas esprimata, kaj la plena propozicio estas:

Vi ne povas iri *antaŭen*.

Mi devas ankoraŭ... *en la oficejon*.

(= Mi devas ankoraŭ iri *en la oficejon*).

20

ALIAJ KOMPLEMENTOJ DE L' VERBO

Kaŭza komplemento.

La komplementoj de kaŭzo dividiĝas en du klasojn:

1^a *Komplemento de efika kaŭzo:*

Ĉi tiu komplemento indikas la kaŭzon per kies efiko disvolviĝas la objekto de verbo:

La flago pendigiĝis *de l'vento* (= La *vento* pendigis la flagon).

Mia vesto malpuriĝis *de l'koto* (= La *koto* malpurigis mian veston).

De zorgoj, / ne de jaroj blankiĝas la haroj (= *Zorgoj, / ne jaroj* blankigas la harojn).

La malsanulo tremis *de febroy* (= *Febroy* tremigis la malsanulon).

La viro paliĝis *de kolero* (= *Kolero* paligis la viron).

Si restis dispremita *de timo* (= *Timo* dispremis ŝin).

La aero resonis *de bruo terura* (= *Bruo terura* resonigis la aeron).

De kantado senpaga doloras la gorĝo (= *Kantado senpaga* dolorigas la gorĝon).

2ª Komplemento de determina kaŭzo:

Ĉi tiu komplemento indikas la kaŭzon per kies motivo disvolviĝas la objekto de verbo:

Ĉiuj ekscitiĝas *pro ĝojo*.

Ni venis *pro serioza afero*.

La maro estis griza *pro ŝaŭmo*.

Ili ridas *pro lia naiveco*.

Li amas tiun ĉi knabinon *pro ŝia beleco / kaj boneco* (= kaj *pro ŝia boneco*).

Pro kio vi ploras?

La ĉasistoj provis la novan pulvon *pro pruvo*.

La oficistino devis kuŝi tutan tagon en lito *pro malvarmumo*.

Kompara komplemento.

La komplemento de komparo indikas tutan klason de sama speco kun kiu oni komparas la objekton de verbo:

Emma estas la plej alta *el ĉiuj knabinoj*.

Jozefo estas la malplej riĉa *el ili*.

Andreo estas la pli juna *el la fratoj*.

Gabrielo estas la malpli juna *el la fratoj*.

El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

Tiu knabo estas la plej inteligenta *el la klaso*.

La dekstra estas la pli forta *el la manoj*.

Si estas la pli lerta *el ambaŭ*.

Maniera komplemento.

Ĉi tiu komplemento indikas kiel disvolviĝas la objekto de verbo:

La du amikinoj promenas *kun mano en mano*.
 Ili marŝadis *kun flanko ĉe flanko*.
 Li parolas *kun la ĉapelo sur la kapo*.
 La maristoj luktis *kun kuraĝo* kontraŭ la marondoj.
Kun bruo oni malfermis la pordegon.
 Ŝi demandis *kun batanta koro*.
 La oratoro parolis *kun elokvento*.
 Doktoro Titolavida foriras *kun longa nazo*.
 La herkulo sin prezentis *kun aplombo*.

Komplemento de rimedo aŭ ilo.

Ĉi tiu komplemento indikas la rimedon aŭ ilon per kiu disvolviĝas la objekto de verbo:

Ni vidas *per la okuloj* / kaj flaras *per la nazo*.
 Oni sendis leteron *per portisto*.
 Vegetaranoj sin nutras *per legomoj*.
 Li batis la hundon *per bastono*.
 Ni estas parencoj *per Adamo*.
 La planko estis kovrita de l'kelnero *per tapiŝo*.
 Li trafis *per la parolo* rekte en la vizaĝon de sia kontraŭulo.

Komplemento de argumento.

La komplemento de argumento indikas la argumenton pri kiu disvolviĝas la objekto de verbo:

Paculino parolis *pri Esperanto*.
 Oni multe dubas *pri lia deklaro*.
 Ni ĉiuj kunlaboras *pri l'sukceso* de nia afero.
Pri la apero terura ili al mi rakontis.
 Li estas kontenta *pri sia ekzameno*.
Pri havo najbara oni estas malavara.
 Juru *pri tio*.

Komplemento de kuneco.

Ĉi tiu komplemento indikas kun kies kuneco disvolviĝas la objekto de verbo:

Nia samideano edziĝis *kun fraŭlino Berta*.
 Kiu ne estas kontraŭ vi, / estas *kun vi*.
 La zorganto mem venis *kun siaj familianoj*.
Kun kiu vi festas, / tia vi estas.
 Ni manĝis *kun niaj koleginoj*.
 La generalo rajdis *kun sia adjutanto*.
 La urbestro laboris ĝis noktomezo *kun sia adjunkto*.

Komplemento de seneco.

Ĉi tiu komplemento indikas la personon, animalon aŭ aferon sen kiu disvolviĝas la objekto de verbo:

La generalo venis *sen adjutanto*.
 La urbestro laboris la tutan tagon *sen adjunkto*.
 Li donis al mi teon kun sukero, / sed *sen kremo*.
Sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus.
 Ne venas honoro *sen laboro*.
 "Vi tute ne estas ĝentila", / diris la feino *sen kolero*.
Sen fajro ne brulas eĉ pajlo.

La prepozicio *sen* povas uziĝi ankaŭ kun infinitivo:

Muso Miki restis du tagojn *sen manĝi*.
 La suno neniam leviĝis *sen rigardi batalojn*.

Oponkomplemento.

Ĉi tiu komplemento indikas la kontraŭstaron malgraŭ kiu disvolviĝas la objekto de verbo:

Rondulino eliris *malgraŭ mia malpermeso*.
 La unuaj esperantistoj paciencie eltenis *malgraŭ la multaj atakoj / kaj malagrablaĵoj*.
 Esperanto sukcesis *malgraŭ ĉiaj oponoj*.
 La registaro plenumis la reformon *malgraŭ la forta opozicio de l' kontraŭaj partioj*.
Malgraŭ tiu perdo li estas ankoraŭ riĉa.
Malgraŭ sia beleco ŝi estas malplaĉa pro sia malhumilo.
Malgraŭ la laciga vojaĝo la aktortrupo ludis verve.

Distinga komplemento.

La komplementoj de distingo dividiĝas en du klasojn:

1^a *Ekskluziva komplemento* kun la signifo *ekster, kun escepto de, esceptinte.*

Ĉi tiu komplemento indikas la personon, animalon aŭ aferon ekskluzive de kiu disvolviĝas la objekto de verbo:

Tie estis ĉiuj miaj fratoj *krom Petro.*

La Esperantaj vortoj *krom kelkaj tre malmultaj* ne estas arbitre elpensitaj.

Mi diris al vi nenion alian *krom la plej pura vero.*

En la salono estis neniu *krom li / kaj lia fianĉino.*

Kiel internacia ne povas esti elektita ia alia lingvo *krom arta (= artefarita).*

La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion *krom mokoĵ / kaj atakoj.*

2^a *Inkluziva komplemento* kun la signifo *ne nur, sed ankaŭ.*

Ĉi tiu komplemento indikas la personon, animalon aŭ aferon inkluzive de kiu disvolviĝas la objekto de verbo:

Krom Petro tie estis ankaŭ ĉiuj miaj fratoj.

Krom la pratika flanko la Esperantismo havas ankaŭ alian flankon idean.

Per pruntedono ofte oni perdas *krom sia have* ankaŭ la amikon.

La pli juna filino estis *krom tio* unu el la plej belaj knabinoj.

En la urbodomo staris granda kunvenantaro *krom la urbestro.*

La prepozicio *krom* povas uziĝi ankaŭ antaŭ infinitivo kun la signifoj de ekskluzivo kaj de inkluzivo:

1^a kun la signifo de ekskluzivo:

Vi nenion povas fari *krom kunbati viajn dentojn.*

2^a kun la signifo de inkluzivo:

Cu ne ekzistas alia bono por la homo *krom manĝi / kaj trinki?*

Anstataŭa komplemento.

Ĉi tiu komplemento indikas la personon, animalon aŭ aferon per kies anstataŭo disvolviĝas la objekto de verbo:

Ne servas larmo *anstataŭ* armo.

Vi povas uzi citronon *anstataŭ vinagro*.
 Metu mielon *anstataŭ sukero*.
Anstataŭ fruktoj li donis al mi fromaĝon.
 Dum mia foresto mia kolego deĵoros *anstataŭ mi*.
 Nun la oficejon zorgas oficisto *anstataŭ oficistino*.

La prepozicio *anstataŭ* povas uziĝi ankaŭ kun infinitivo:

Anstataŭ babili laboru.
 Vi batis Luizon *anstataŭ bati Paŭlon*.

Iufoje la infinitivo de l'komplemento povas esti subkomprenata:

Vi batis Luizon *anstataŭ... Paŭlon*.

Disdona komplemento.

Ĉi tiu komplemento indikas la mezuron distribuatan individue al ĉiu persono, animalo aŭ afero:

Oni trovas biletojn *po 8 florenoj* ĉe l'sekretario (=Ĉiu bileto kostas 8 florenojn).
 Oni povas nokti *po ses dolaroj* (=Oni devas pagi ses dolarojn ĉiunokte).
 La gastoj trinkis *po glaseto* da vino (=Ĉiu el la gastoj trinkis glaseton da vino).
 La komitato estas rebalotata ĉiun trian jaron *po triono* (=Ĉiun trian jaron oni rebalotas unu trionon de l'komitato).
 Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, / kaj al ĉiu el la infanoj mi donis *po tri pomoj* (=Ĉiu infano ricevis tri pomojn).
 Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; / tial, / se mi legos en ĉiu tago *po dek kvin paĝoj*, / mi finos la tutan libron en kvar tagoj (=Se mi legos dek kvin paĝojn en ĉiu tago, / mi finos la tutan libron en kvar tagoj).

* * *

Ĉiuj prepozicioj uziĝas kune kun substantivo kaj la esprima valoro de komplemento sidas en la tuta grupo de vortoj kune konsiderataj (prepozicio + substantivo) kaj la atributoj ĝin akompanantaj.

Kaj la prepozicioj:

anstataŭ
 antaŭ ol

ĝis
inter
krom
por
sen

povas uziĝi ankaŭ kun infinitivo, kiam la objekto esprimata de ĉi infinitivo estas plenumata de l'nominativo de l'propozicio, kiel ekzemple:

*Vi batis Luizon anstataŭ (vi) bati Paŭlon.
Ni trinkis vermuton antaŭ ol (ni) ekmanĝi.
Inter voli kaj fari estas granda diferenco.*

La komplementoj de l'verbo estas tiom multnombraj kiom la homaj esprimoj, tamen estus senutile doni ĉi tie liston pli vastan, ĉar per la ekzemploj cititaj la leganto jam kapabliĝis por ilin distingi per si mem.

KUNMETITAJ PREPOZICIOJ

Krom la originalaj prepozicioj en Esperanto povas formiĝi kunmetitaj prepozicioj, kiam la funkcio de komplemento postulas.

Ĉi prepozicioj povas formiĝi el du originalaj prepozicioj kiel:

cis	de	kontraŭ	de
ĉirkaŭ	de	trans	de
de antaŭ		de inter	
de apud		de post	
de ĉe		de sub	
de ĉirkaŭ		de super	
de el		de sur	
el antaŭ		el sub	
el de		el trans	
el inter			
ĝis antaŭ		ĝis super	

tra inter
k. t. p.

aŭ el gramatika partiklo kune kun originala prepozicio kiel:

antaŭ	ol	ek	de
dis	de	for	de
			k. t. p.

aŭ el adverbo — derivata de vortradiko de ajn gramatika kategorio — kune kun originala prepozicio kiel:

danke	al	prebare	al
favore	al	propreie	al
fronte	al	„	je
honore	al	„	kun

kompense	al	renkonte	al
konforme	al	responde	al
„	je	rilate	al
„	kun	spite	al
konsidere	al	„	de
paralele	al	vidalvide	al
„	kun		
age	de	laŭ-larĝe	de
aparte	de	laŭ-longe	de
daŭre	de	manke	de
dekstre	de	memore	de
maldekstre	de	meze	de
de-pende	de	„	en
de-tempe	de	„	inter
ekskluzive	de	najbare	de
escepte	de	nome	de
fare	de	norde	de
fine	de	sude	de
flanke	de	oriente	de
funde	de	okeidente	de
helpe	de	okaze	de
ige	de	proksime	de
inkluzive	de	„	je
interne	de	„	al
kaŭze	de	malproksime	de
komence	de	„	je
komisie	de	„	al
koncerne	de	rezulte	de
kondiĉe	de	sekve	de
konsekvence	de		

kelke da

inter-konsente	kun
inter-rilate	kun
kompare	kun

dividite per
multiplikite per

multe da

kontraste	kun
nivele	kun

obligite per
k. t. p.

Kunmetita prepozicio, kies adverbo estas derivata de verba radiko, povas uziĝi ankaŭ sen la originala prepozicio akompananta ĉi tiun,

kaj la substantivo formanta la komplementon prenas la liberan akuzativon. Tiel ekzemple:

Koncerne de l'lingva vidpunkto Esperanto superas la naciajn idiomojn.

Oni povas diri ankaŭ:

Koncerne la lingvan vidpunkton Esperanto superas la naciajn idiomojn.

Koncerni estas transitiva radiko, tamen ĉi gramatika formo povas uziĝi ankaŭ kun netransitiva radiko, kiel:

Esperanto superas la naciajn idiomojn *rilate al simpleco*, / *logikeco* / kaj *perfekteco*.

Oni povas diri ankaŭ:

Esperanto superas la naciajn idiomojn *rilate simplecon*, / *logikecon* / kaj *perfektecon*.

Rilati estas netransitiva radiko.

Koncerne la lingvan vidpunkton Esperanto superas la naciajn idiomojn *rilate simplecon*, / *logikecon* / kaj *perfektecon*.

Koncerne de l'lingva vidpunkto aŭ *koncerne la lingvan vidpunkton*, kaj *rilate al simpleco*, / *logikeco* / kaj *perfekteco* aŭ *rilate simplecon*, / *logikecon* / kaj *perfektecon* estas du komplementoj de l' verbo *superas*.

En Esperanto estas ankaŭ formoj kiel *dank'al*, *far'de*, k. t. p., kiel kunmetita prepozicio. En ĉi tiu kazo la apostrofo okupas la lokon de l' finaĵa -O kaj la kunmetita prepozicio estas formata de substantivo kune kun originala prepozicio: *danko al*, *faro de*, *multo da*. k. t. p. Tamen ĉi tiuj formoj estas malmulte uzataj.

Ekzemploj:

Penu rekte pensi en Esperanto. — La Romo *de l'antikvaj romanoj* daŭris *de 753 a. K.* (= antaŭ Kristo) ĝis *475 p. K.* (= post

Kristo). — La Romo de *l'Papoj* daŭris de 775 de nia erao ĝis 1870. — La tria Romo, ĉefurbo de *Italio*, komenciĝis en 1870. — *Ek de tiu jaro* Romo estas la ĉefurbo de *Italio*. — *De post tiu jaro* Romo ĉesis esti papa regno. — En 1929 fondiĝis en Romo la *Urbo de l'Vatikano*, / kiel sendependa regno sub la regado de *l'Pontifiko*. — Oni fiksis tabulon videblan de el la trajnoj preterpasantaj. — En milita tempo perfidulon oni pafmortigas de post la dorso. — La kato saltis el malantaŭ la muro. — El post la muro li estas bravulo. — Li trafis el sub pluvo en riveron. — El sub la kanapo la muso kuris sub la lito, / kaj nun ĝi kuras sub la lito. — La infano estis forportita de ĉe sia patrino. — La suno brilis sur lin tra inter la branĉoj. — La arbaro de *Fontenblo* estas 50 kilometrojn for de *Parizo*. — Marta staris jam kelke da paŝoj for de ŝi. — Neniu devas paroli kontraŭe de sia konscienco. — Tonoj sonis transe de *l'densa kurteno*. — “Simpla, / fleksebla, / belsona, / vere internacia en siaj elementoj, / la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de lingvo internacia; / ĉar, / tre facila por homoj nemulte instruitaj, / Esperanto estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj. / Mil faktoj atestas la meriton praktikan de la nomita lingvo.” (*Zamenhof*.)

Sen trograndigo oni povas diri, / ke Esperanto estas almenaŭ 50 fojojn pli facila, / ol ĉia lingvo natura. — Esperanto sukcesis *danke al ĉies helpo* (= *danke ĉies helpon*). — La urbestro donis balon *honore al la delegitoj* (= *honore la delegitojn*). — Oni decidis tion *konforme al la leĝo* (= *konforme je l'leĝo / aŭ konforme kun la leĝo*). — Nia biblioteko estas aranĝita *konforme al la bibliografia sistemo*. — Oni devas rekompenci iun ajn *proporcie al la faritaj servoj* (= *proporcie je l'faritaj servoj, / aŭ proporcie kun la faritaj servoj*). — *Renkonte al li iris virino*. — *Holandina venis el Ĉikago al Novjorko renkonte lin*. — Tion mi diras *responde al viaj demandoj* (= *responde viajn demandojn*). — *Rilate al la korekteco de l'lingvo* tiu libro estas rekomendinda (= *rilate la korektecon...*). — Oni *ne liberigis lin spite de liaj protestoj*. — Oni devas konservi sin *fidela al sia konscienco spite al ĉia perforto*. — Agrabla ĝardeno kuŝas *vidalvide al la ĉefa stacidomo*. — La lernado de multaj lingvoj plenigas la memoron per vortoj anstataŭ per faktoj. (*Niĉe*.)

La vortstrukturo / kaj frazkonstruo en Esperanto estas vera arto. — La fondo de Romo *age de l'fratoj Romulo / kaj Remo* okazis en 753 a. K. (= *age la fratojn Romulo / kaj Remo*). — *Escepte de li ĉiuj estis ĝojaj* (= *escepte lin*). — Ili konsentis *pri l'reguligo de salajroj / kaj laborkondiĉoj fare de l'ministro* (= *fare la ministron*). — Si haltis *fine de ĉiu strofo* (= *fine ĉiun strofon*). — *Ambaŭflanke de*

l'pordo staras statuo. — La tri metilernantoj staris *flanke de sia majstro*. — La boato mergiĝis *funde de l'maron*, / kaj *nun ĝi kŭsas funde de l'maro*. — Li povis fari sian karieron *nur helpe de sia influa favoranto* (= *helpe sian influan favoranton*). — La fondo de Romo *ige de l'fratoj Romulo / kaj Remo okazis en 753 a. K.* (= *ige la fratojn...*). — *Kaŭze de l'malbona vetero mi ne venos al vi hodiaŭ*. — *Komence de l'jaro okazos la ekzameno* (= *komence la jaron*). — *Salutu lin komisie de mi* (= *komisie min*). — Ili skribis al la Esperanta Akademio *koncerne de tiu demando* (= *koncerne tiun demandon*). — *Dum la Esperanta Kongreso oni celebris ankaŭ solenajn ceremoniojn memore al Zamenhof* (= *memore Zamenhof'n*). — Forta bruo vekis ĉiujn *meze de l'nokto*. — La aeroplano *rapide troviĝis meze de l'nebulon*. — Nia aŭto haltis *meze en la ŝlimo*. — La ligna dometo staras *meze en rizkampoj*. — Malgranda taĉmento de *puŝtrupo restis meze inter la malamikoj*. — *Meze inter ĉiuj okupoj pri Esperanto* Hodler trovis tempon por fari la vojaĝon. — Kiel internacia ne povas esti elektita alia lingvo krom neŭtrala.

La gepatroj devas alkutimigi siajn infanojn al la Internacia Lingvo paralele kun la gepatra idiomo. — *Najbare de l'ŝoseo* estis kaŝitaj oazoj. — Mi vin petas *nome de via patrino!* — Mi salutas vin *en la nomo de nia grupo*. — Eŭropo sidas *norde de Mediteraneo*. — *Sude de tiu maro* estas Afriko. — *Oriente de Andoj* sterniĝas Argentino, / kaj *okcidente de tiu montaro* etendiĝas Ĉilio. — Oni iluminis la stratojn *okaze de l'Esperantotago* (= *okaze la Esperantotagon*). — La radiostacio estas *proksime de nia ejo* (= *proksime je nia ejo*, / aŭ *proksime al nia ejo*). — Tiu projekto staras *ankoraŭ malproksime de realiĝo*. — La kuraĝo kreskas *kune kun la danĝero*. — *Kune kun Esperantina* mi iros ĉi tiun vesperon al la cirko. — 38 *dividite per 3* faras 12 / kaj restas 2. — 6 *multiplikite per 10* faras 60. — Ses *obligite per dek* faras sesdek. — *Piede de l'paĝo* troviĝas klariga noto. — La elpenso de *l'hokopinglo* perdiĝas *en la pasinteco*. — Kiam oni bone scipovas nian lingvon, / la vortoj venas flue / kaj glate sur la lango. — Esperanto estas lingvo / kaj sento. (*Zamenhof.*)

22

AKUZATIVO KAJ PREPOZITIVO

La aldono de l'litero *-n* al ia vorto formas la gramatikan akuzativon:

Mano *manon* lavas.

Saĝa kapo *duonvorton* komprenas.

kaj la sekvantajn komplementojn:

La forĝisto plantis kojnon <i>frapon post</i> <i>frapo</i>).	}	(maniero-akuzativo)
(= La forĝisto plantis kojnon <i>frapo post</i> <i>frapo</i>).		
La ujo renversiĝis <i>la fundon supren</i> .		

Revenu <i>la sekvantan tagon</i> .	}	(tempo-akuzativo)
------------------------------------	---	-------------------

<i>Unu vesperon</i> la alilandulo sidis sur sia bal- kono.	}	(daŭro-akuzativo)
---	---	-------------------

Mi estas <i>unu jaron</i> pli juna, / ol vi.	}	(mezuro-akuzativo)
La kanalo estas longa <i>dek kilometrojn</i> .		
La domo estas alta <i>kvin etaĝojn</i> .		
La klubo distancas <i>tri domojn</i> de l'stratan- gulo.		
Si retiriĝis <i>kelkajn paŝojn</i> .		
La termometro altiĝis <i>38 gradojn</i> super la nulo.		

Prepozicio plus substantivo kaj prepozicio plus infinitivo formas la kazojn dativo kaj agantivo:

Al amiko nova ne fidu sen provo.

La kongreso estis vera triumfo *por Esperanto*.

Li estas kolera *kontraŭ ni*.

Belina faris la vojaĝon *por plezuro*.

Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia.

Esperanto estis publike iniciatita *de Zamenhof* en 1887.

Ĉi tiu gramatika formo (prepozicio + substantivo aŭ infinitivo) nomiĝas *prepozitivo*. Ankaŭ la aliaj komplementoj formataj de prepozicio kun substantivo aŭ infinitivo nomiĝas *prepozitivaj*:

La forĝisto plantis kojnon <i>per frapo post</i> <i>frapo</i> .	}	(maniero-prepozitivo)
La ujo renversiĝis <i>kun la fundo supren</i> .		

Revenu je l'sekvanta tago. } (tempo-prepozitivo)

Je unu vespero la alilandulo sidis sur sia }
balkono. } (daŭro-prepozitivo)

Mi estas je unu jaro pli juna / ol vi.
La kanalo estas longa je dek kilometroj.
La domo estas alta je kvin etaĝoj.
La klubo distancas je tri domoj de l'strat- }
angulo. } (mezuro-prepozitivo)
Si retiriĝis je kelkaj paŝoj.
La termometro altiĝis je 38 gradoj super la }
nulo. }

Tial ke inter akuzativa formo kaj prepozitiva formo de l'elemen-
toj en propozicio estas nenia diferenco de valoro, povas transformiĝi
akuzativa formo en prepozitivan kaj inverse, ĉiam ke tio ĉi ne faru
la paroladon malklara, kaj sen forgesi, ke en Esperanto povas esti
nur unu sola gramatika akuzativo en sama propozicio.

Kelkaj prepozicioj uzataj kiel prefiksoj transformas netransitivan
verbon en transitivan verbon, kaj ĝiajn komplementojn kun prepo-
zitiva formo en akuzativon:

Ili ridas pro lia naiveco.

Ili ridas je lia naiveco.

transformiĝas en:

Ili pri-ridas lian naivecon.

Mi sopiras pro mia perdita feliĉo.

Mi sopiras je mia perdita feliĉo.

transformiĝas en:

Mi pri-sopiras mian perditan feliĉon.

La elpensanto meditis pri nova maŝino.

La elpensanto meditis je nova maŝino.

transformiĝas en:

La elpensanto *pri-meditis novan maŝinon.*

Ekzemploj:

“Ni povas diri / “obei al la patro” / kaj “obei la patron” anstataŭ “obei je la patro”. — Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, / kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; / ekzemple: / ni povas diri: / “pardonu al la malamiko” / kaj “pardonu la malamikon”, / sed ni devas diri ĉiam / “pardonu al la malamiko lian kulpon”. — Ni ne povas diri: / “sciigi amikon novaĵon”, / sed ni devas diri ĉiam: / “sciigi amikon pri novaĵo”, / aŭ “sciigi novaĵon al amiko”. — La Universala Vortaro de Esperanto enhavas ĉiujn komune uzatajn vortojn. — La Internacia Lingvo entenas en si sanktan, / grandan / kaj gravan ideon. (*Zamenhof.*)

La Esperantismo progresas ĉiujare pli kompare kun la laste pasinta jaro. — Enfermu la hundon. — Enŝlosu la kaptitojn. — Nur la vortoj, / kiuj sukcesis eniri en la ĉiutagan literaturon, / povas vivi daŭre. — Ne enmiksi vin en malproprajn aferojn. — La pordisto enlasis nur la invititojn. — La mekanikisto enpumpis aeron en la pneŭmatikojn. — Ŝi enspiris la parfumajn blovojn. — Fjŝo pli granda malgrandan enĝlutas. — Tiun sumon mi enskribis en vian kalkulon. — La pirato enterigis la rabetan trezoron en senhoman insulon. — Budo por kultiviloj estas ĉe rando de l'arbaro. — Multaj novaj samideanoj ĉeestis la lastan kunsidon de l'komitato. — La Esperantan vortaron havu ĉiam ĉemane. — Kaŝe ili iris apud la muron. — Kaŝe ili apudiris la muron. — Li estas apud sia patro. — Apudborda saliko etendas siajn branĉojn super la rivero. — Eksploza bruo interrompis lian sieron. — Ankaŭ la prezidanto intervenis en la diskuton. — Ili interparolis verve. — Ili interkonsentis la prezon de l'varo. — La esperantisto povas interŝanĝi ideojn kun malproksimaj homoj.

Per Esperanto oni havas amikajn interrilatojn kun ĉiuj homoj. — Oni devas iri tra l'korto por eniri en la domon. — Oni devas trairi la korton por eniri en la aŭtejon. — Homoj / kaj popoloj devas iafaje pasi tra malfacilaj okazintaĵoj. — Homoj / kaj popoloj devas iafaje trapasi malfacilajn okazintaĵojn. — Ni veturis tra l'tuta Eŭropo. — Ni traveturis la tutan Eŭropon. — Strangaj ideoj traflugis al li tra l'kapo. — Tiu penso traflugis lian spiriton. — Vivon travivi estas art' malfacila. — Maldensa kurteno tralasa la lumon. — Vitro estas travidebla. — La lernanto trastrekis la desegnon. — Lernolibron oni ne devas tralegi, / sed tralerni. — La karavano tranoktis en la dezerto. — La kinematografa trupo faris tramaran vojaĝon. — La mallerta

kondukisto traplugis *per pneŭmatikoj* la bedojn. — Esperanto triumfas ĉiufoje, / kiam ĝi servas al iu.

La Esperantismo celas la reciprokan sinkomprenadon / kaj konsekvence ankaŭ estimon / kaj amon inter ĉiuj gentoj / kaj nacioj. (*Zamenhof.*) — La tero ĉirkaŭiras la sunon. — La tero rondiras *ĉirkaŭ la suno*. — Ili ĉirkaŭiris la angulon. — Strangaj famoj komencis ĉirkaŭflugi *tra l'urbo*. — Mi ĉirkaŭprenis mian malnovan amikon. — Oni ĉirkaŭbaris la flugkampon. — Ambaŭ ĉirkaŭbrakis sin *reciproke*. — Ĉirkaŭdoma ĝardeno ornamas la lokon. — Vi ĝisvivis *ankoraŭ* tiun ĝojon. — Ĝisfinu la libron, / kaj vi ĉesos esti fremdaj *rilate al la aliaj popoloj*. — Mi provos *iom post iom* forlasi mian ĝisnunan manieron. — Kvankam li estas *jam* plenkreskinta, / tamen li portas *ankoraŭ* ĝisĝenuan pantalonon. — Muzikistaro antaŭiris la manifestacion. — Ni devas *ĉiam* antaŭeniri, / *ne* timante la malhelpojn. — Pluraj antaŭvidis la fiaskon *de tiu entrepreno*. — Kelkaj antaŭdiris la malsukeeson *de tiu senĉira vojo*. — Kinino antaŭgardas kontraŭ febro. — La maljunulino havis bonan antaŭsenton. — Vi antaŭjuĝas *neguste*. — La sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala.

La Esperantismo devis batali kontraŭ malkompreno por venki. — Mi deziras antaŭpagi mian kotizon. — Vi devas esti antaŭzorga, / kaj asekuri vin kontraŭ eventuala incendio. — La libro *ne* havas antaŭparolon. — Antaŭbrako estas parto *de l'supraĵ membroj de l'kubuto ĝis la manradiko*. — *En Esperanto* la akcento estas *ĉiam sur la antaŭlasta silabo*. — Nur malspritulo povus paroli kontraŭ Esperanto. — Nur malspritulo povus kontraŭstari la Esperantismen. — Ŝi staris *forte* kontraŭ ĉiuj forlogoj. — Ŝi *ne* povis kontraŭstari sian seivolon. — *Senĉese* flavbekulo kontraŭdiras sin *mem*. — Tiu verkisto postvivis sin *mem*. — La parolado postlasis fortan impreson *ĉe l'publiko*. — Antaŭparolo liberigas *de postparolo*. — Fervojo, / aeroplano / kaj radio faris la teron malgranda, / kaj la gepatra lingvo sola ne plu sufiĉas por la interrilatoj inter homoj / kaj popoloj.

23

INTERNA AKUZATIVO

La sekvantaj prepozicioj uzataj kiel prefiksoj:

antaŭ
ĉe
el

en
 ĝis
 kontraŭ
 laŭ
 per
 post
 preter
 pri
 super
 sur
 tra

povas transformi netransitivajn verbojn en transitivajn verbojn kaj la komplementojn kun prepozitiva formo en akuzativojn, kiel ekzemple:

Permesu al mi *ek-spiri*.

Ekspiri estas netransitiva, sed kun prepozicio kiel prefikso transformiĝas en transitivan kiel en:

La sablo *el-spiras* ardantan varmegon.

Tamen, kiam la koncepto esprimata de l'substantivo en akuzativo kaj la objekto esprimata de l'verbo *estas similaĵ*, tiam la prefikso —derivata de prepozicio— de l'verbo povas esti subkomprenata, kiel en:

La ekskursantoj *spiris* puran aeron.
 (= La ekskursantoj *en-spiris puran aeron*).

La ĉambro *spiras* la odoron de l'rozoj.
 (= La ĉambro *el-spiras la odoron de l'rozoj*).

La avo *fumas* pipon.
 (= La avo *el-fumas pipon*).

Si *ploris* maldolĉajn larmojn.
 (= Si *el-ploris maldolĉajn larmojn*).

Zamenhof *vivis* fervoran / kaj puran vivon.
 (= Zamenhof *tra-vivis fervoran / kaj puran vivon*).

Tiu *vivis* longajn jarojn.
 (= Tiu *tra-vivis longajn jarojn*).

La bebo *dormis* trankvilan dormon.
 (= La bebo *tra-dormis trankvilan dormon*).

Li *dormas* sieston.
 (= Li *tra-dormas sieston*).

Car tio, kion esprimas la akuzativo, estas jam pli malpli *entenata en la verba voĉo*, ĉi akuzativo nomiĝas *interna akuzativo*, kaj la prefikso de l'verbo povas esti subkomprenata kiel ni vidis en la suprecititaj ekzemploj.

Esperanto estas tiel logika en ĉiuj siaj partoj, ke ĝia simpla estas surpriza; sed ĝuste pro tio, observante sian ĉefan leĝo-regulon, Esperanto ne posedas logikon absolutan, matematikan, faritan de akvaĉioj, kontraŭe logikon vivan, kiu respondas en ĉiaj okazoj, al neceso de klaro kaj kompreno.

Danke al tio, iafoje, pro analogia leĝo povas subkompreniĝi la prefikso derivata de prepozicio, sen la ekzisto de interna akuzativo, kiel en la sekvantaj ekzemploj:

Ili *ridas* lian naivecon.
 (= Ili *pri-ridas lian naivecon*).

Mi *sopiras* mian perditan feliĉon.
 (= Mi *pri-sopiras mian perditan feliĉon*).

Ĉiuj verkoj, / vortoj / kaj agoj de Zamenhof *spiras* altan idealon.
 (= Ĉiuj verkoj, / vortoj / kaj agoj de Zamenhof *el-spiras altan idealon*).

La lingvo Esperanto uzita de Graboski *spiras* vervon.
 (= La lingvo Esperanto uzita de Graboski *el-spiras vervon*).

Tiu libro *respondas* ĝeneralan bezonon.
 (= Tiu libro *pri-respondas ĝeneralan bezonon*).

La trupo *ludos* gajan teatraĵon.
 (= La trupo *pri-ludos gajan teatraĵon*).

La protagonisto *ludis* sian rolon sen afekto.
 (= La protagonisto *tra-ludis sian rolon sen afekto*).

Li *ludas fluton*.
(= Li *sur-ludas fluton*).

La orkestro *ludis valson*.
(= La orkestro *pri-ludis valson*).

La diboĉuloj *ludas kartojn por mono*.
(= La diboĉuloj *pri-ludas kartojn por mono*).


Ekzemploj:

Oni ne bezonas eksterordinaran talenton por ellerni Esperanton. — Mi suriris la ŝtuparon. — La intertropikaj regionoj havas *dense* surkreskitan teron. — La horizonton surverŝis la ora koloro *de l'leviĝanta suno*. — La bubaĉoj surĵetis kuniklon *per ŝtonoj*. — La bubaĉoj ĵetis ŝtonojn *sur kuniklon*. — Kampo estis surpluvata. — La oficistino surstampis la poŝtmarkon por nuligi ĝin. — La kelnero surtabligis supujon. — Ni vidis monteton surkovritan *per pinoj*. — *Per volo* vi povas superi ĉiujn malfacilaĵojn. — La urbon superstaras monteto. — Monteto staras *supere al la urbo*. — La sukceso superpasis la esperojn. — *Jam* kvin jaroj pasis de post tio. — Tiu princepto superregas ĉiujn aliajn. — Nia ŝtato estas regata *kun prudento*. — Nilo superverŝis Egiption. — Milito verŝas multajn malfeliĉojn / kaj suferojn *sur la landojn*. — La tombisto superŝutis la ĉerkon *per tero*. — La enhavo *de l'sakoj* estas ŝutata *en korbojn*. — Mi estas superŝarĝita *per laboro*. — La Esperanta alfabeto havas ses literojn *kun supersigno*. — Superjaro havas 366 tagojn *anstataŭ 365*, / kiel la ordinara jaro. — La fleĝistino subtenis la maljunulon *sub la brakoj*. — Ili prenadis subaĉeton / kaj juĝadis *maljuste*. — *Pro pluvo* la kamparano forlasis la plantadon, / kaj subiris tegmenton. — La suno subiras (= La suno subiras la horizonton). — La vicedirektoro subskribis la dokumentojn. — Oni *ne* povas subpremi tiun bezonon. — Kelkaj samideanoj submetis proponon al atenta konsiderado de l'Akademio *de Esperanto*. — Propozicio povas havi vortojn subkomprenitajn. — La jako havas subŝtofon *el silko*. — La subjupo *de l'junulino* estis rozkolora. — La knabo uzis gvidan subpaperon por skribi *sur la sentimia folio*. — Veronika amas laŭiri la marbordon. — Tiu inĉapelo posedas laŭmodan fasonon. — Laŭvorta traduko povas perfidi la sencon *de l'originalo*. — Ĉiu ricevu *laŭmerite*. — Uzante Esperanton, / multaj kontraŭaĵoj estas evitataj en turismo.

Vi povas resti la plej bonaj nacianoj, / kaj tamen esti sinceraj esperantistoj vere 100-procentaj. — Ni preteriris tri vilaĝojn *survoje*.

— Ni iris *tro malproksimen* / kaj preterpasis la kolecion *sen vidi ĝin*.
 — Ni pasis *preter la aerodromo sen vidi ĝin*. — Si preterpasis *kelke da butikoj*. — Admirante la pejzaĝon, / Mateo pretervidis la benzinstacion. — Mateo vidis *preter la benzinstacio*. — Preterlasu nenian klopodon por sukcesigi vian ideon. — La eksvicurbestro preteratentis la tempolimon. — Si *pretervole haltis sur la sojlo*. — La fraŭlino *nur pase*, / *preterfluge*, / *apenaŭ ion aŭdis pri tio*. — Cezaro transiris Rubikonon. — Tiuj provoj *ankoraŭ ne transpaŝis la komencajn stadiojn*. — Oni transpasis *de l'avertoj al la agoj*. — La elmigrantoj traveturos la maron. — La elmigrantoj veturos *trans la maron*. — La familio translokiĝis *de sur la strato Zamenhof al la strato Esperanto*. — La portistoj transportis la meblojn *de l'antaŭa loĝejo en la novan*. — Mi transdonis vian ludilon al la infano. — Mi transprenos *de l'komisiono la taskon verki la raporton*. — Li prenis la leteron *el la mano de l'sendito*. — Multaj kapitaloj translokiĝis *el Eŭropo al Ameriko*. — La elmigrintoj transformis la dezertan agron *en kulturejon*. — Oni transdiris al li la vortojn *de l'loĝantoj*. — Zamenhof transvivas *en la memoro de ni ĉiuj*. — La cisalpa Gallio estis formita *de Norditalio*, / kaj la transalpan formis la vasta regiono *inter Pirineoj / kaj Rejno*. — La ministro por internaj aferoj zorgas *interrege ankaŭ la ministrejojn por eksterlandaj aferoj*. — Holandina vojaĝis *eksterlanden*.

Ni ne volas nin tiel humiligi, / ke ni apliku elsterlandan idiomon apud la gepatra, / kvazaŭ ni estus kolonio de ties lando. — La dumvivaj membroj *de nia asocio* pagas subtenan kotizon *por unu fojo*. — Ilia dumnokta irado estis malfaciligita *de foresto de l'luno*. — Tiu magazeno vendas *nur pogrande*. — Por aĉeti *pomalgrande* oni devas iri *en butiko*. — *Ofte* oni pagas laboristojn *popece / aŭ pohore*. — Ili produktas 30 pliajn procentojn, / *ol antaŭe*. — La pinoj konsistigas 60 procentojn *de l'tuta arbaro*. — Vi estu mia advokato / kaj porparolu *en tiu afero*. — Vi estu mia anstataŭanto, / kaj porparolu *en tiu kunveno*. — La vidvino devis perlabori la vivrimedojn *de l'tuta familio*. — Kion sorton *ne donas / perforte ne serĉu*. — Kromnomo estas aldonita nomo. — Jeĵuro estas ĵuro farita *pri io*. — Oni jeĵuris al li (= Oni ĵuris fidelon al li). — Oni jeĵuri por tio (= Oni ĵuris plenumi tion). — Oni jeĵuris kontraŭ iu (= Oni ĵuris fari malbonon kontraŭ iu). — Samideanoj! ne klinu vin plu antaŭ fremdaj nacioj. — Postulu la neŭtralan Esperanton kiel diskutlingvon en internaciaj kunvenoj.



Se terminó de imprimir el día
veinte de septiembre de mil no-
vecientos cuarenta y nueve en
los talleres gráficos de la Com-
pañía Impresora Argentina,
S. A., Alsina 2049-Buenos Aires.

Tiu ĉi libro finpresigis je la
dudeka de septembro de mil
naŭcent kvardek naŭa ĉe Com-
pañía Impresora Argentina,
S. A., Str. Alsina 2049-Bonaero.

De Hispanio ĝis la insuloj Filipinaj
tra la vasta mondo hispanlingva

Breve Historia del Esperanto

varbas por la Esperantismo

Prezo afrankite: \$ 0,30 argentina mono aŭ 2 inter. respondkuponoj

A. LOPEZ LUNA

Z A M E N H O F

INICIADOR DEL ESPERANTO

Novelo-biografio pri Pioniro de la Homaro.
Hispanlingve.

Prezo a frankite: \$ 5.- argentina mono aŭ 25 inter. respondkuponoj

U. L.

UNIVERSALA LIGO

Mondfederalista Esperanto-Organizo.

Oficiala organo: la bone konata Esperanto-gazeto "La Praktiko"

**Centra Oficejo de la Universala Ligo:
Riouwstraat 172, DEN HAAG (Nederlando)**

Prezo a frankite: \$ 1.- argentina mono aŭ 5 inter. respondkuponoj.